

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1090 (17/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- UEA 113-jara! 2
- I Gruppi della FEI si raccontano, ma non basta una volta sola! 2
- Ĉu vi ŝatas voĉlegi? 2
- Unesko ĝojas pro 5686 respondoj 3
- Questionario per professori 4
- Nuligita UK, bonvenon VK! 4
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 4



Fondita
la 28-an de aprilo
1908

uea

Universala Esperanto-Asocio

113-jara

Homoj kun homoj



uea.org/alighoj/alighilo

I GRUPPI DELLA FEI SI RACCONTANO, MA NON BASTA UNA VOLTA SOLA!

Martedì 11 maggio 2021 alle ore 21:00, tutti assieme per la nostra storia e per il nostro futuro; il secondo incontro si terrà il 18 maggio

L'11 maggio intervengono i seguenti gruppi:

-Vercelli, -Roma, -Napoli, -Parma, -Abruzzo, -Padova, -Mantova, -Tuscolano, -Bergamo, -Grosseto, -Milano, -Trento.

Entrate nella riunione in Zoom
<https://us02web.zoom.us/j/87584114714?pwd=cnNvRlV3bkqzRzkrL0NGTTBSYnRiZz09>

ID riunione: 875 8411 4714

Passcode: 169900

Il secondo incontro sarà il giorno 18 maggio, sempre h. 21,00 con altri gruppi che vi indicheremo.

Moderatore: Laura Brazzabeni




ĈU VI ŜATAS VOĈLEGI?


Se vi ŝatas deklami/voĉlegi aŭ se vi konas aliajn geesperantistojn, kiuj tion ŝatas, bv. helpi por diskonigo de la Internacia Konkurso pri poezio de Botev kaj bulgaraj renesancaj aŭtoroj. Temas pri tradicia konkurso, en kiu ankaŭ tradicie partoprenadis geesperantistoj. La E-partopreno estas tre grava por ni, ĉar ĝi kutime estas vaste raportata de lokaj kaj naciaj amaskomunikiloj, kaj la vorton

"Esperanto" legas aŭ aŭdas centmiloj da bulgarioj. Pasintjare la konkurso tute ne okazis pro la pandemio. Ĉi-jare ĝi okazos virtuale. Tio malfermas la pordojn por pli vasta internacia partopreno. Bedaŭrinde, la eksa kunordigantino el la E-societo en Vraca, kie okazas la konkurso, forpasis, kaj ŝia posteulo malbonfartas post cerbinfarkto. :- (Do mi klopodas distance kunorganizi laŭ miaj ebloj. Ajna helpo bonvenas!!!

Jen la anonceto, kiun mi (kun iuj modifoj) publikigis en Facebook:

Virtuala konkurso por ŝatantoj de la arta parolo:  Partoprenu

kaj  partoprenigu!  Ne nepras lerni parkere, eblas ankaŭ voĉlegi!  Limdato: la 20a de majo 2021. Legu pri la partopren-kondiĉoj kaj trovu E-tradukojn ĉe: <http://bea.espereto.com/botev-konkurs-vraca-2021/>

 Bv. helpi al ni montri al la bulgara publiko, ke Esperanto vivas kaj viglas! La E-partopreno en la konkurso kutime estas raportata de pluraj amaskomunikiloj. Ĉi-jare pro la pandemio la konkurso okazos virtuale, kaj tio ebligas vastan partoprenon. Antaŭdanke, Mariana Evlogieva

UNESKO ĜOJAS PRO 5 686 RESPONDOJ AL ENKETO EN ESPERANTO: LA ENKETO DAŬROS ANKORAŬ DU MONATOJN

La 3-an de majo, demandite de la 2-a Vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao, la respondeculo ĉe Unesko pri la enketo: Futuroj de Edukado;, S-ino S. Magalage, respondis jene, kopie al la komisiito de UEA pri Konsciigo, Renato Corsetti, mem la iniciatinto kaj tradukinto de la enketo en Esperanton:

Kara Trezoro Huang Yinbao,

Dankon pro via mesaĝo. La 1-minuta enketo Futuroj de Edukado restos uzebla ankoraŭ dum du monatoj. Ni estas tre ĝojaj informi vin, ke ĝis nun [je la 11-a horo matene la 3-an de majo] al la Esperanto-lingva versio de la enketo respondis 5 686 personoj. Surbaze de tiuj respondoj, via komunumo konsideras, ke la ĉefaj tri defioj estas: 1) Klimata ŝanĝiĝo; 2) Ekonomiaj malegalecoj; 3) Armila konflikto/milito. Rigarde al la tri celoj de edukado [klerigado], oni elektis: 1) Homajn rajtojn; 2) Pacon; 3) Daŭripovon. En tiu ĉi momento 52% de la respondintoj estas viroj, 43% virinoj (certa kvanto el la enketitoj preferis ne informi pri la seksa aparteno). Aparte interesa estas la fakto, ke la junularo (inter la aĝo de 15-30 jaroj) provizis nin per 42% de la respondoj: estas bonege, ke danke al vi ni eksciis multe pli pri la junularaj vidpunktoj rilate tiujn gravajn demandojn. Ni ĝojus ricevi pliajn respondojn de via komunumo. Dankon ankoraŭfoje por via granda subteno kadre de tiu ĉi iniciato.

S. Magalage

Per ĉi tiu Gazetara Komuniko la Estraro de UEA esprimas siajn dankojn al: ĉiuj individuaj partoprenintoj; Landaj kaj lokaj Esperanto-asocioj kaj -kluboj; fakaj asocioj, precipe ILEI, TEJO, IKEF, UMEA kaj iliaj landaj sekcioj; lernejoj kaj kursoj pro iliaj instigoj al siaj lernantoj; kaj speciale al Esperanta Civito, Libera Folio, La Ondo de Esperanto kaj ĉiuj Esperanto-retejoj kaj Esperanto-radioj pro iliaj kunlaboremaj informadoj kaj alvokoj per siaj kanaloj. La Estraro petas ĉies daŭrajn kontribuojn por varbi novajn partoprenantojn. UEA refoje alvokas, ke ĉiu ankoraŭ nerespondinta esperantisto plenigu la facilan enketilon laŭ la indiko sur la retejo: <https://en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto>

QUESTIONARIO PER PROFESSORI

Se conoscete qualche professore universitario di materie letterarie o linguistiche fategli avere senza insistere questo indirizzo

<https://forms.gle/SM4wTRMD749mFGJAA>

È un questionario in italiano messo in piedi in occasione del prossimo congresso internazionale della Lega internazionale degli insegnanti di esperanto - ILEI.

Non fate pressioni, mi raccomando. Se rispondono va benissimo. Se non rispondono almeno sanno che c'è qualcuno che fa inchieste sull'esperanto.

IL CONGRESSO UNIVERSALE DI BELFAST È STATO ANNULLATO, CAUSA CORONAVIRUS, MA ECCO IL SECONDO CONGRESSO VIRTUALE!

2-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO: JAM EBLAS ALIGHI, SENPAGE POR INDIVIDUAJ MEMBROJ DE UEA ĜIS LA 4-A DE JULIO

Malfermiĝis hodiaŭ, la 4-an de majo, la aliĝilo al la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): <https://vk.esperanto.net>. La 2-a VK okazos dum la tagoj antaŭviditaj por la nuligita 106-a Universala Kongreso, nome de la 17-a ĝis la 24-a de julio. Ĝi havas la saman kongresan temon: "Paco kaj konfido: universalaj valoroj" (<https://uea.org/gk/920>). Provizora programo baldaŭ aperos.

La aliĝo al la VK estas senpaga por Individuaj Membroj (IM) de UEA (kaj TEJO), kiuj aliĝas ĝis la 4-a de julio 2021. Frua aliĝo gravas, por ke la organizantoj povu proponi la plej bonajn rimedojn kaj servojn. Post tiu dato, estas antaŭvidata simbola kotizo pro kostoj de traktado de malfruaj aliĝoj.

Por aliĝi al la VK IM-oj de UEA devos unue indiki sian UEA-kodon. Se la sistemo ne rekonas la kodon, vi povas kontroli ĝin ĉe <https://uea.org/via/persono>. Se vi aliĝis lastatempe, povas esti ke la sistemo de VK ankoraŭ ne havas la plej ĝisdatan informon de la datumbazo de UEA pri via membreco en 2021. Tiukaze, bv. sciigi tion al la indikota retadreso dum la aliĝprocezo. Se vi ankoraŭ ne membras en UEA por 2021, eblas - plej simple - samtempe aliĝi al UEA kaj la VK per la VK-aliĝilo. Tio ebligas al la sistemo tujan sciigon pri via individua

membreco en UEA. Aliĝi al la VK sen membriĝi en UEA ankaŭ eblas, kontraŭ aliŭkotizo de 50 EUR ĝis la 4-a de julio kaj 75 EUR post tiu dato.

Subtenaj donacoj por realigo de la VK bonvenas. Ĝi estas ampleksa projekto, kiu implicas diversspecajn kostojn, kaj ĝiuj donacoj gravas. Ĉiuj, kiuj donacos ekde 50 EUR, fariĝos oficialaj "Subtenantoj de la Virtuala Kongreso". Eblas facile donaci per la kreditkarta formularo ĉe la VK-aliĝilo - aŭ per via UEA-konto al la fonduso por la Virtuala Kongreso ([https://uea.org/alighoj/donacoj/virtuala kongreso](https://uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso)) kun sciigo al la Financa Fako (financoj@co.uea.org). La nomoj de la donacintoj aperos (laŭkonsente) en danklisto ĉe la listo de aliĝintoj (senpere, se la donaco okazas per la VK-aliĝilo, aŭ post konfirmo de la Financa Fako, se ĝi okazas pere de UEA-konto). UEA antaŭdankas ĉiujn subtenantojn.

Simile al la pasintjara VK (<https://mondafest.net/programo/>), la 2-a VK havos riĉan kaj vigran programon dum ok tagoj. Ĝi prezentos ne nur popularajn programerojn de la tradicia Universala Kongreso, kiel Internacia Kongresa Universitato (IKU), Scienca Kafejo, Tago de Lernado, Aŭtoraj Momentoj, Libro de la Jaro, Akademio de Esperanto kaj Aukcio, sed ankaŭ multajn aliajn novajn programerojn. La programo antaŭvidas plurajn artajn kaj kulturajn momentojn, virtualajn ekskursojn kaj sukcesajn programerojn de la pasintjara VK, kiel la virtualajn ekskursojn kaj la specialan programeron pri kuirarto tutmonde. Ne maltrafu la 2-an Virtualan Kongreson! Aliĝu plej frue: <https://vk.esperanto.net>.